


LA JUNA VIVO



MONATA ORGANO POR LERNEJANOJ

T.J.O. CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO, ĜIRO 382363 • JARKOTIZO 1.- NED. GULD. AŬ EGVALORO

Karaj Lernejanoj,

Eble kelkaj el vi estas malkontentaj, ĉar vi sendis verkaĵon kaj ĝi ne aperis en „La Juna Vivo”.

Nu, havu paciencon, mi petas. Ne ĉiam la verkaĵoj tuj povas aperi. Tio dependas de la spaco en nia gazeto. Kaj ankaŭ de la enhavo. Plej interese ja estas havi rakontojn kaj verkaĵojn el multaj landoj, ĉu ne? Ni ja lernas Esperanton, por ke ni povu legi pri ĉiaj homoj en ĉiuj landoj de la mondo. Kaj ĉiu homo kaj ĉiu regiono havas siajn tipajn ecojn.

Mi dezirus, ke vi nun ĉiuj povu veni al Nederlando, por vidi la belajn florkampojn. Ili havas tiom da koloroj kaj tiel bonodoras! Bedaŭrinde, ke ili restas nur mallonge!

N. K.


Suzette, la franca knabino.

Suzette venas el suda Francujo. Ŝi havas blondan hararon. Ŝia vizaĝo plaĉas al mi, ĉar ŝi havas bluajn okulojn, etan nazon kaj rozkolorajn vangojn. Ŝi portas blankan bluzon, verdan korsajon, verdan kaj ruĝan jupon kaj blankan antaŭtukon. Sur ŝiaj kruroj estas blankaj ŝtrumpetoj.

Dorothy M. Kilgow, Tinkers Farm Sec. Mod. School,
Northfield, Birmingham, Britujo.

NIA VERKILO.


La vorto: **PER**.

 *parolas* La homoj **per** la buŝo.


1.

aŭskultas  Mi **per**


2.



3.
skribas




4.
vidas




5.
segas



6.
flugas



7.
montras



8.
boras

Tendaro „Verda Stelo” (daŭrigo)

La 1-an kaj 2-an de aŭgusto ni vekigis kovritaj de roso. La suno brilas kaj bele prilumas la kampon, kie ni dormis. Vagonare ni iras ĝis Neuf Brisac kaj ni trapasas la limon per ŝarĝaŭtomobilo ĉar la fervojo estas detruita. Jen Freiburg kaj Konstanz. Ni enŝipiĝas kaj transiras la lagon. Tio plaĉas al ni. Poste ni uzas vagonaron kaj alvenas al Landeck (Tirolo). Ni estas akceptataj de s-ro Hilkersberger kaj la esperantista grupo.

Ni matenmanĝas. La pano tre bone gustas pro kumino. La tendaron ni instalas sur malgranda kornico. De tie ni vidadas la altegajn kaj impresajn montojn. Kelkaj estas tute verdaj, aliaj rokmontrantaj, aliaj kun neĝ-ĉapelo ĉe la pinto.

Ni multe interparolas kun niaj aŭstriaĵoj gekamaradoj, per Esperanto kompreneble, kaj kiel eble plej bone. Agrable kaj gaje ni kunvivas ĝis la 15-a de septembro. Ni ofte grimpas sur la montoj (ĝis 2700 m), ni banas nin, ni multe vizitas kaj ekskursas. Unuvorte ni havas ĉiutage multe da distro. Tre ofte akompanas nin la Landek-aj kamaradoj aŭ s-ro Hilkersberger kaj ĉiam ni estas bone akceptataj de la enloĝantoj. Kelkfoje ni revenas kun tute malsekaj vestoj. Kia plezuro tiam aŭdi la afablan voĉon de s-ino Hilkersberger kaj ŝian inviton alproksimiĝi al la fajro por sekigi la vestojn!

Vespere, la 16-an de septembro, salutinte la nederlandajn esperantistojn, ni ekiras al la stacidomo, akompanataj de ges-roj H. Denove ni uzos la vagonaron, sed returnen. Ĉagreno plenigas niajn korojn pro la foriro; ankaŭ tiujn de niaj tirolaj amikoj. Oni promesas interŝanĝi oftajn leterojn


Ekiras la vagonaro kaj ĉiuj rememoras la pasintajn belajn tagojn

Jes, bela estas Tirolo. Kaj kio postrestas el tiu tendumado? Bona memoro, kelkaj kuriozaĵetoj, nenio pli; sed tamen tio estas mirinde valora

Kaj al mi restas ankaŭ bona amikineto, kiun mi ne forgesos.

Jean Claude van den Hecke, Kergoat, Le Hinglé, Côtes du Nord.

Kverelo sur la fenestro-breto (daŭrigo).



„Kiom malgranda estas tiu,” diris la longa kanto al la dika.

„Tial ĝi certe rampis sur tiun altan objekton,” rediris la dika.

„Kie estas via florpoto?” ĝi tiam demandis al la bulbo sur la vazo. La longulo diris: „Ĉu vi ne havas teron por kreski?”

La bulbo diris: „Ĉu mi rajtas prezenti min? Mi estas Hiacinto. Mia nutraĵo estas en mia bulbo. Mi bezonas nur akvon por porti la nutraĵon al miaj folioj. Mi ne bezonas teron por bele flori. Mi estas bulba kreskaĵo.”

Nun parolis la ciklamo: „Ankaŭ mi havas bulbon, sed tio ja ne estas kialo por stari la tutan tagon kun nudaj radikoj antaŭ la fenestro! Fi!”

Al la hiacinto ne tre plaĉis la starado sur la fenestro-breto.

„Mi multe laboros por kreski,” ĝi decidis. Ĝi suĉis tiom, kiom ĝi povis, kaj kreskiis ĉiutage.

(Daŭrigota).

Paskaj kutimoj en Ĉeĥoslovakujo. ¹⁾

En kelkaj regionoj (ekzemple en Kulm apud Aussig, ĉe Elbe) oni jam ses semajnojn antaŭ pasko semas avenon en kesto kun tero. Je „sankta ĵaŭdo” (3 tagojn antaŭ pasko) venas la „pasko-leporo”. Ĝi demetas ovojn en la aveno. En la mezo de la kesto staras ĉokolada aŭ alia leporo, ĉirkaŭ ĝi kokidoj aŭ ŝafidoj el ĉokolado aŭ el alia frandaĵo.

La sonoriloj en la preĝejo silentas. Laŭ la legendoj ili estas for, en Romo, por nova konsekriĝo.

Por anstataŭi ilin infanoj faras bruon ~~per~~ klakiloj aŭ knariloj. Ili iras de domo al domo, diras paskajn poemojn kaj ricevas belajn multkolorajn ovojn. (En aliaj regionoj (ekz. Turnov) la knaboj je paska lundo vizitas gekonatojn kun ornamitaj „vergoj”. Ili kantas paskajn kantojn, „vergas” la knabinojn kaj rekompence ricevas ovojn).

Je sankta vendredo oni en la preĝejo vizitas la tombon de la „Sankta Mortinto”.

Je sankta sabato la preĝejaj sonoriloj en la mateno ree sonoras. En Kulm la knabinoj tiam iras al la rivereto por lavi sin per fluanta akvo. Laŭdire tio estas ŝirmilo kontraŭ lentugojn. (Verdire tio estas simbola puriĝo post longa vintro).

En la vespero kandeloj kaj multkoloraj lampoj lumas en la fenestroj de la domoj. Sankta procesio iras tra la stratoj. Petolaj junuloj faras bruon per eksplodigiloj. (Ĉu eble simbolo de krevantaj burĝonoj?)

¹⁾ Ni ricevis diversajn verkaĵojn. Bedaŭrinde ni povis fari nur resumon. Kelkaj havas belajn ilustraĵojn pri knariloj, vergoj, ovodesegnaĵoj k.t.p. Precipe la desegnaĵoj de Václav Špetlík en Turnov estas tre belaj. Pro teknikaj kaŭzoj bedaŭrinde ne eblis aldoni ilin. Red.

Fine estas paska dimanĉo. En Kulm tiam venas je la sepa matene la „paskaj rajdantoj”. Ili kaj ankaŭ iliaj ĉevaloj surhavas belajn florojn kaj rubandojn. Muzikantoj iras antaŭe. Oni kunportas krucon kaj sanktajn bildojn kaj la procesio iras al la preĝejo, kie oni ekstere celebras sanktan meson.

Dum la festotagoj oni manĝas specialan panon el pasto kiel por kukoj. En Turnov multaj familioj je paska ĵaŭdo manĝas iun farunaĵon, kiun oni nomas „Judaso”. Oni preparas ĝin kun mielo kaj butero. Je la paskaj tagoj oni ofte manĝas ŝafoviandon.

ENIGMOJ.

Mi ricevis dudek (20) provojn. La plej multaj estis tute ĝustaj. El ĉi tiuj venis dek naŭ (19) el Britujo, la 20-a kuraĝulo estis F. Pecka el Ĉeĥoslovakujo. Ĉi tio ne estas kontentiga: mi esperas, ke ankaŭ lernantoj en aliaj landoj eklaboros!

La solvoj estas: 1. Al ĉiu besto plaĉas ĝia nesto. Preĝu kore kaj laboru fervore.

2. Omaro — **R**omo — moki — kiom — omaro.

T. K. S.

Novaj enigmoj: I. Serĉu kvar vortojn laŭ jenaj indikiloj: 1. Multvalora ŝtono. 2. La tuto de ĉio, kio ekzistas 3. Filo de frato. 4. Ofende fiere. La UNUAJ kaj TRIAJ literoj de la trovitaj vortoj nomas ion, kion vi atendas ĉiumonate.

II. Kreskantaj radikoj.

Rigardu jenajn arojn de radikoj:

K	K
KE	OK
KEL	LOK
KELK	BLOK

Nun trovu similan grupon helpe de ĉi tiuj indikiloj: 1, Litero. 2, Afikso. 3, Sekvi literojn per la okuloj. 4, Prizorgi malsanulon.

Kaj fine vi mem faru tian grupon — kun indikiloj.

Sendu vian provon antaŭ la 15-a de junio al s-ro T. K. Slade, 7 Southview Road, Southampton, Anglujo.

(La angla poŝto permesas malpli altan afrankon, se la koverto restas nefermita kaj sur ĝi staras: „Edukaj ekzercaĵoj”. Oni esploru, ĉu tio eblas ankaŭ en aliaj landoj.)



**6-a Internacia Junular-Kunveno
en Konstanz, Germanujo
(28/7—4/8 1950)**

Adr. de la loka Organiza Komitato: Michel Schmidt, (17b)
Konstanz a. B., Grüngang 9

Ĉis la 20-a de aprilo anoncis sin 280 partoprenantoj el 13 landoj. Dank' al la subteno de la „Freibürger Institut für internationale Begegnungen” ni povos akcepti plurajn el la pli malriĉaj, precipe orientgermanaj, geamikoj senkoste.

La prepara laboro bonege marŝas. Sed — la sukceso de la kunveno dependos ankaŭ de partoprenantoj mem. Ili zorgu por bonaj programeroj en la festvesperoj! Studu kantojn, dancojn, teatraĵetojn, ktp.! Ĉiu helpu laŭpove!

La karavano el Denton (Manchester, Britujo) konsistonta el 28 personoj, vojaĝos al Konstanz per speciala aŭtobuso.

Ili petas helpon al Esperantistoj kaj Rotarianoj por trovi tranoktejojn kaj manĝejoj. Je 26-7-'50 ili deziras tranokti en la ĉirkaŭaĵo de Arras, je 27-7 kaj 4-8-'50 en Belfort kaj en Parizo je 5-8-'50. Kiu povas helpi, informante pri kostoj de dormejoj kaj restoracioj, bonvolu skribi al la gvidanto: s-ro Norman Williams, M.A., B.Sc., lernejestro de la Denton County Secondary School en Denton, Manchester, Anglujo.

POŝTMARKRUBRIKO.

Oskar Svantesson denove surprizis nin per du dikaj leteroj kun 450 svedaj poŝtmarkoj. Viajn leterojn ni ĉiam bonvenigos, sveda amiko!

A. Navarro sendis 100 hispanajn pm. Ni dankas vin, kaj esperas, ke vi jam ricevis viajn ekzemplerojn.

Nia fervora kamarado Michel Schmidt, kiu organizas nian kongreson en Konstanz, denove donacis germanajn pm. Kiu bezonas da ili?

Ĉiun monaton ni ricevas francajn pm. Nun de L. Chasseraud. Ni jam respondis. Ĉu kontentige?

Jos Kunert el Peterworth (Germ.) probable posedas milionojn da pm. Ni jam ricevis 2200 malnovajn ekzemplerojn.

Ĉu vi jam trovis niajn en via leterkesto? Vian leteron ni detale

respondos. Kamarado Kunert, komprenu ke ĉiuj homoj estas niaj amikoj. Ni bone komprenas, ke la vivo en via lando estas malfacila. Estas ĝojige, ke viaj tri knabinoj volonte legas nian gazeton. Ne estu tro seniluziigita! La vero ĉiam venkos, kaj ankaŭ la justeco. Vi kaj ni travivas la konsekvencojn de milito. For la armiloj!

Gunhild Thomson donacis 125 danajn pm. Dankon!

Fine 200 pm. el Maroko, de nia juna verkistino f-ino Zarca. Koran dankon. Ni volonte korespondos kun vi. Ĉu ĝis la I.J.K. en Konstanz? Ni esperas.

En la antaŭa n-ro ni erare skribis, ke ni ricevis poŝtmarkojn de s-ro Secco el Maroko. Tio devis esti el Tunizio. Dankon, amiko, ankaŭ pro viaj interesaj artikoloj!

Amikoj en la tuta mondo: Skribu! Sendu viajn poŝtmarkojn! Ne prokrastu, ni povas interŝanĝi ĉiujn kvantojn por vi.

Kiu el vi povas fari skizon por kapo super nia rubriko?

Libro-Servo, Edam (Ned.).

Ni gratulas:

Ges-rojn Leereveld—Majoor, Capittenweg 47, Blaricum al kiuj je la 10-a de marto naskiĝis filineto: Laura Marcelle.

Ges-rojn Hooyberg-Wit, Peperstr. 31, Purmerend (antaŭe W. Graftdijk), al kiuj je la 30-a de marto naskiĝis filineto: Henny.

Ges-rojn Bout-Seilberger, Aegidiusstr. 13, Rotterdam kaj Ges-rojn Koopmans-Schotanus, „Malgranda Paradizo”, Vosmaerlaan 3, Hilversum, kiuj geedziĝis je la 12-a de aprilo 50.

Varbu nun abonantojn por „La Juna Vivo”.

Kiu abonos ekde la 1-a de julio ricevos la junian numeron senpage!



KORESPONDADRESOJ

Ĉeĥoslovakujo: Josef Novák, Ohrazenice 7 p., Turnov, 15-j. knabo, dez. kor. k. interŝ. poŝtm. kaj poŝtkartojn kun la tuta mondo.

Miaj gelnantoj (12-15-j.) dez. kor. k. samaĝuloj en multaj landoj. Adr.: L. Holoubková, Lázně Jeseník, Stredni skola (Komeského ul.)

Miloslav Vlk, 18-j. studento, dez. kor. pri ĉio, kun ĉiuj landoj. Resp. certa. Ces. Budějovice, Kněžská 14.

Kiu sendas al mi bildon pri akvo (il. pk. kun haveno, akvofalo, lago) ricevos il. pk. de mia regiono. Alois Safránek, Regnovice 120, p. Alexovice.

Jos. Vild, faka instruisto, Rokycany 116/II, dez. interŝ. pm. Resp. certa. Jarmila Freibergová, instruistino de antaŭlernejo dez. interŝ. pk., k. pm. k. kor. kun l.t.m. Strašice u Rokycan.

18-j. studento dez. kor. per il. pk. k. 15-18-j. knabinoj, prefere britaj k. francaj. Frant. Král, ul. K. Čapka 30, České Budejovice.

Mi dez. kor. kaj interŝ. poŝtm. kaj poŝtk. kun geesperantistoj en la tuta mondo. S-ro J. A. Pátek, Sovadina 46, p. Bystrice p./Host.

Danujo: Lernantinoj en duagrada lernejo dez. kolektivian interŝanĝon de il. materialo por vivigi la geografian instruadon. R. Thorsen, instruistino, Dyblandsvangen 7, Brh. Kopenhago.

Francujo: 5 fraŭlinoj, 18-20-j. dez. kor. k. geamikoj en la tuta mondo. Adr.: O. Chevalier, 24 rue Jean Prévost, Grenoble (Isère).

40 lernantinoj, 14-16-j. dez. kor. k. gesamaĝuloj en la tuta mondo. Skribu al: S-ino Thébaut, 174 Av. Dampierre, Valenciennes (Nord).

30 knaboj, 12-14-j. dez. kor. kun samaĝuloj en la tuta mondo. Adr.: Dumarquez, lernejestro, Noeux-les-Mines (Pas de Calais).

Germanujo: Rudolf Hauger, 19-j., dez. kor. k. juna an(in)o de J. P. Sartre por interŝ. pensojn. (17b) Donaueschingen, Max-Egonstr. 2.

17-j. junulo dez. kor. kun samaĝaj geknaboj en la tuta mondo (Intereso pri fotoj). Hans Peintinger, Mittenward (Obb.) Hotel Post.

19-j. esperantisto dez. kor. kun gesamideanoj en la tuta mondo. Adr.: Siegfried v. Gottschalck, (10a) Dresden 128, Wernerstr. 21.

F-inoj Ingeborg Borchers, (Hörschel apud Eisenach (Thüringen) kaj Jutta Peltsch (15a, Mühlhausen, Feldstr. 42, dez. kor. k. l. t. m.

Koresp. kun gejunuloj (ĉefe katolikaj) en Germanujo, esperant- k. naci- lingve peras volonte: H. Jos. Togeretz, Kreuzweg N-ro 6, Düsseldorf.

Hispanujo: José Rubí Jacomet, str. Pasaje Obrero 99, Tarrasa, dez. interŝ. poŝtm. k. ĉ. l. en la tuta mondo. Respondo certa.

José Ma Gaus, str. Pujol 5, Barcelona, dez. kor. k. ĉ. l. pri ĉ. t. Respondo certa. Ankaŭ interŝ. esp. k. hisp. librojn kaj il. poŝtk.

Rafael Sorolla, str. Torrente Vidalet 13, 1º, Barcelona, dez. interŝ. poŝtm. k. ĉ. l. Resp. certa, se estas per rekomendita letero.

K-ino Maria Sala, Str. Consejo de Ciento 126, 1º = 1ª, Barcelona, dez. kor. kun ĉiuj landoj. Interŝ. il. poŝtk. ktp.

Santiago Guillem Batet, str. Nueva 18, Almatret, dez. kor. kun la tuta mondo, per il. poŝtk. Certa respondo.

Petro Buscató, str. Av. José Antonio 284, 3º = 2ª, Barcelona, interŝanĝas let., poŝtk. (poŝtm. bildflanke) kun seriozuloj.

Hungarujo: 15-j. knabo dez. kor. kun gesamideanoj en la tuta mondo. Adreso: Karlo G. Lázár, VI Eötvös u. 29, Budapest.

Josefo Bangha-Varga, XI Bartok Belastr. 50. II./IA, Budapest, 30-j. teknikisto k. universitata stud. dez. kor. ankaŭ angle, france, germane.

Japanujo: 17-j. gimnaziano dez. kor. k. interŝ. poŝtm. k. il. poŝtk. kun geamikoj en Eŭropo. Emiko Kamiya, Kooyamachi 2-11, Kumamotokyoku-kunai.

Nederlando: 16-j. lernanto dez. kor. kun samaĝa knabino el: Italujo, Hispanujo aŭ Portugalujo. P. F. v. Marrum, Augustinusga 88, Fr.

Estonta Instruistino, 19-j., dez. kor. kun estontaj geinstruistoj eksterlandaj. Resp. certa. Tanja Staritsky, Leidsevaart 556, „Espero”, Haarlem.